

Þórbergur Þórðarson, verkisto kaj esperantisto 1889 - 1974

La 4an de aprilo 1950, meztage post tagmangho en la komuna manghsalono de la gimnazio en Akureyri, mi eniris mian chambron por kolekti iujn librojn por la posttagmezaj lecionoj. Tiam eksonis kontrau min por la unua fojo la belsonaj vortoj de lingvo, kiun mi estis fervore studinta dum la antaŭa somero. Ivo Lapenna estis adiaŭanta la islandan popolon pere de la Shtata radio. Mi kunchambrano, posedanto de la radio-aparato, vokis kontrau min, kie mi staris transformita kvazau la edzino de Lot: "Auskultu, tion nur vi devas kompreni, vi fantaziulo!" Tia estis mia unua sperto pri parolata Esperanto.

D-ro Ivo Lapenna adiaŭis la islandan popolon post unumonata vizito al la lando. Li venis por plivigli la islandan Esperanto-movadon, por prelegi kaj por instrui. Li prelegis en la universitato en Reykjavík sub la prezido de Alexander Jóhannesson, profesoro pri filologio kaj kompara lingvistiko, ankaŭ en tri lokoj ekster la chefurbo. Liajn prelegojn, chiam faritajn en Esperanto, tradukis samtempe Ólafur Þ. Kristjánsson, elstara esperantisto kaj verkinto de Esperanta-islanda vortaro. Lapenna ankaŭ instruis la lingvon en tri kursoj: por komencantoj, por progresantoj kaj por infan-instruistoj. Li partoprenis 4 kunsidojn de *Auroro*, la Esperanto-societo en Reykjavík, faris paroladojn kaj gvidis diskutojn. Jarojn poste mi havis la okazon tralegi la protokolojn de tiuj kunsidoj de *Auroro*. El tiuj oni povas konstati la celon de la vizito de Lapenna: konatigi la internacian lingvon, instigi al progreso de la lingvo, helpi plivigli la societatan vivon de la esperantistoj kaj informi pri Universala Esperanto-Asocio. Li parolis pri la historio de la lingvo, pri progresoj kaj malprogresoj, pri la neceso de grandskala propagando kaj forta societa vivo. Li parolis pri siaj spertoj dum la militaj jaroj en Jugoslavio. Li menciis, ke meze en la milito, en novembro 1943, 60 esperantistoj kunvenis en kongreso en la urbo Livno en Bosnio, dum la kanonoj bruadis. Tio montras, li diris, ke oni chie kaj chiam, kiaj ajn estas la cirkonstancoj, povas labori por Esperanto. Multaj cheestis tiujn kunsidojn kaj estas evidente, ke la rejkjavikaj esperantistoj konsideris la viziton de d-ro Lapenna kiel grandan eventon.

Trarigardante la listojn de cheestantoj en la kunvenoj, mi tuj rimarkis la nomon de la nacifama verkisto kaj elstara esperantisto Þórbergur Þórðarson. Tamen ne estas mencio pri tio, ke Þórbergur ion diris en la kunsidoj, au ke oni prezentis lin aparte al d-ro Lapenna. Tio ne mirigis

min, Þórbergur estis homo netrudema en personaj kontaktoj, malgrau sia eksterordinara traf-forto en siaj kritikaj verkoj. Þórbergur tiam estis 60-jara, kaj jam antau pli ol du jardekoj chesis aktive partopreni agadon por la lingvo por sin dedichi tute al verkado en la islanda lingvo. Tamen estis la tempo, ke la nomoj de Þórbergur kaj Esperanto estis intime kunligitaj en la menso de chiuj Islandanoj. Efektive tiel estas ech ankoraŭ nun, che homoj mezaghaj kaj pli aghaj. Estas ekster dubo, ke neniu unu homo tiom laboris por disvastigi la ideon pri internacia lingvo en Islando, efektive mi emas kredi, ke lia egalulo apenau estas trovebla en iu ajn lando. Tiun unikecon Þórbergur atingis en sia pozicio kiel eksterordinara verkisto en la islanda lingvo, konata, legata kaj preparolata tra la tuta lando, kaj memsekve li uzis siajn verkistajn talentojn en siaj multegaj propagandaj artikoloj kaj en unu granda libro pri la temo. Certe jam estas tempo provi prezenti tiun elstaran verkiston kaj propagandiston al eksterlandaj esperantistoj. Mi diras "provi", char ne estas facila tiu tasko. Þórbergur, malgrau sia funkcio kiel vera apostolo por la internacia lingvo, estas tamen tiel intime ligita al islandaj cirkonstancoj kaj al la islanda lingvo kiel verkisto, ke estas verŝajne neplenumbla tasko lin prezenti plenkomprenige al alilandanoj. Tamen mi provos, kvankam estas antaŭvideble, ke mi sukcesos nur ektushi la temon. Unue mi iom pritraktos la eksterordinaran pozicion de Þórbergur kiel verkisto en la islanda lingvo, poste lian aktivadon por la lingvo internacia.

Þórbergur Þórðarson estis la plej influa verkisto en la islanda literaturo en 20a jarcento. Halldór Kiljan Laxness, Nobelpremiito 1954, dankis al Þórbergur en omagha artikolo (1963) "pro tio ke li disrompis tiom multajn barojn kaj malfermis tiom multajn pordojn por ni, kiuj lin sekvis, pro tio ke li igis por ni alireblaj, permeseblaj kaj memevidentaj tiom da aferoj kiuj antaŭe estis tabuaj kaj neimageblaj." En libro verkita okaze de la kvindekjarigho de Þórbergur (1939) la verkisto, prof. Stefán Einarsson, citas jenajn vortojn, ŝerce arogantajn, tamen verajn, de Þórbergur: "Tri novajn fenomenojn mi enkondukis, miaopinie, en la islandan literaturon. Ili estas la futurismo, la paradoksoj (antaŭe chiam monotonis la sama plaudado, kvazau dum transraĵdo de la riverego *Hornafjarðarfliót*) kaj senkompata malrespekto koncerne chion, kio estas "sankta" al la homoj pro la prudemo de la shtonighintaj moralaj principoj de la senmova malalta aerpremo, kiu superkushis chi tiun oceanan rokinsulon ekde la tempo de ekloĝhado. Mi enkondukis pli da rapido, viglo, trafo kaj vario en stilo. Kial mi diras "enkondukis"? El tio neniu ion lernis krom mia amiko Halldór Kiljan." Angla literaturisto, Martin Seymour-Smith diras pri Þórbergur en sia granda libro *Funk & Wagnalls Guide de Modern World Literature* (1973). "Considering the world reputation of Laxness, who could never have started without him, Þórðarson has been cruelly neglected outside Iceland; he is a superior writer" (p. 1030).

(Konsiderante la mondan reputacion de Laxness, kiu neniam estus povinta komenci sen lia ekzemplo, Þórðarson estis kruele neglektita ekster Islando; li estas superba verkisto."

Þórbergur Þórðarson naskighis en kampara bieno en sudorienta Islando, filo de farmisto. Kiel junulo li laboris kiel kuiristo sur fishista skuno, sed havis brulantan deziron edukighi. Li komencis studi en la Instruista Seminario en Reykjavík, sed chesis post unu vintro pro elrevigho pri la studmaterialo, provis ekzamenighi por eniro en gimnazion, sed sen rezulto, tamen ricevis permeson ekstudi islandajn lingvon kaj literaturon kiel neregula lernanto en la jhus fondita universitato en Reykjavík. Tiun studon li energie plenumadis dum kvin jaroj (1913-18), sed ne povis havi permeson ekzamenighi, ĉar formale mankis al li studenta ekzameno. Dum siaj unuaj jaroj en Reykjavík Þórbergur vivtenis sin per lauokazaj laboroj dum la someroj. Li tiam konatighis kun junaj romantikaj poetoj kaj komencis mem verki poemojn, kiuj parodiis la romantikan esprimmanieron de liaj amikoj. Specimenoj de liaj parodioj kaj futurismaj poemoj estis presitaj sub la titolo *Duonaj Shuplandoj (Hálfir skóskólar, 1914)* kaj *Vestoj de saghulo (Spaks manns spjarir, 1915)*, ambau reeldonitaj en unu volumeto en *Blankaj korvoj (Hvítir hrafnar, 1922)*, la titolo parodias la titolon *Nigraj plumoj (Svartar fjaðrir)*, novromantikisma poemaro de Davíð Stefánsson, kiu furoris en tiu tempo). Tiuj parodioj jam evidentigis la originalecon de Þórbergur, kaj jam tiam atestis lian ribelemon kontraŭ regantaj literaturaj tendencoj. Li mem, jarojn poste, komentis tiun poemaron en artikolo originale verkita en Esperanto, *Trimil tricent sepdek nau tagoj el mia vivo*, aperigita en *Sennaciulo* 1928: "Mi estis poeto tute moderna. Futuristo, ekspresionisto, superrealisto kaj ankaŭ iom klasika, - ĉio tio mi estis. Mia libreto estis moka ribelo kontraŭ nia sentimentala plorpoezio de lastaj jaroj".

En 1917 Þórbergur subite sin lanchis en profundan studadon de orienta mistikismo, hinda filozofio kaj spiritismo, kaj praktikis jogon kun sufiĉe bonaj rezultoj. Li priskribis tiun sperton kiel unu el siaj "renaskighoj" en elokvente persona esejo, titolita *Eklumo el oriento (Ljós úr austri)*, kiu estas inter la unuaj el tre multaj pri la plej diversaj temoj, kiuj akiris al Þórbergur pintan pozicion kiel la plej originala eseisto en la islanda lingvo. (La "renaskighoj" de Þórbergur nombras entute nau, lau lia *Kroniko de renaskighoj*, pri lia "renaskigho" en Esperanton vidu poste). Þórbergur estis en tiu tempo ravita de la idealo de la teozofoj pri interfrateco de homoj, sed baldau elrevigis lin, ke la teozofoj faris nenion por realigi tiun idealon. Tial li turnis sin al socialismo, kio rapide rezultis en eksterordinara libro, *Letero al Laura (Bréf til Láru, 1924)*.

Letero al Laura havis la celon prezenti la programon de socialismo. Ghi enhavas akrajn atakojn kontraŭ ĉiuj posedantoj de potenco, ne malplej

en la eklezioj luterana kaj katolika, sed ankaŭ kontraŭ teozofoj kaj spiritistoj - pro hipokriteco kaj lukso. Tiu cheftemo estis interplektita per personaj artikoloj, skeĉoj, anekdotoj kaj rakontoj, ofte trafe humoraj je la kosto de la verkisto mem. Kaj la *Letero* estas verkita en elegante eksterordinara stilo, plena de paradoksoj kaj skandalajhoj, ofendaj al agnoskitaj moralo kaj sana prudento. Þórbergur komentis sian libron en la menciita Esperanto-artikolo en *Sennaciulo*: "Grandan venton ghi vekis en nia lando. Multaj admiris mian libron. Chiuĵ laudis la "stilon". Sed la plejmulto indignis kaj timis pro siaĵ posedajhoj dirante, ke la aŭtoro estas danghera al la socia ordo. Plej bedaurinda tamen estis la senmoraleco de la libro. (La vero estas, ke mi estas la plej morala verkisto en Islando). *Letero al Laura* flugis kiel vento tra la tuta lando, vekis multajn el dolĉa dormo kaj turnis kelkajn al socialisma konvinko." Efektive tiu libro de Þórbergur estis turnopunkto en la evoluo de islandlingva proza stilo, kio draste influis aliajn verkistojn, i.a. Halldór Laxness. *Letero al Laura* kaŭzis akrajn disputojn en la gazetoj, kie Þórbergur lanchis pliajn akrajn atakojn kontraŭ la reprezentantoj de eklezio kaj kapitalismo. Sekve de liaĵ artikoloj Þórbergur estis elpelita el du magraj postenoj kiel instruisto de la islanda lingvo en du lernejoj, teknika kaj komerca. Tion Þórbergur komentis en la artikolo en *Sennaciulo*: "Unu membro el la estraro de la teknika lernejo estis la urbestro mem. Li estis avida spekulanto kaj lerta hipokritulo religia, kiu lau amerika modo shtelas grandan monsumon de la urbanoj dum la ses labortagoj de chiu semajno kaj poste havas religiajn diservojn por infanoj dum la dimanĉoj. Li diris al la estraro: "Þórbergur estas herezulo. Li ne estas kapabla konduki la lernantojn al la vivo. Tial li devas iri." La ceteraj anoj de la estraro tuj ekvidis, ke la urbestro malkashis teruran veron. Kaj per tremanta mano de la sklavo ili voĉdonis konsenti lian postulon. La lernantoj protestis chi tiun faron. Tial iliaĵ mastroj minacis ilin per labora perdo, kaj la lernantoj devis humilighi. Unu el la estraro de l' komerca lernejo estis malĵuna ledvendisto kaj drinkulo, homo tute neklera. Li komunikis al la du ceteraj estraranoj (malĵuna eksbankestro kaj teologia docento de la universitato): "Þórbergur estas danghera bolshevisto, kaj ne decas, ke tia ulo instruu niajn lernantojn." La eksservisto de Mamono kaj la servanto de dio vidis, ke la malĵuna ledvendisto malvualis seriozan fakton. Kaj frate benis mian eksigon. Alivorte: En Islando ni havas la jughon pri tio, ke "herezulo" kaj "bolshevisto" ne devas instrui simplan islandan gramatikon. Tiel potenca estas homa frenezo." Tio estis en 1925.

Jam dum siaĵ universitataĵ studadoj Þórbergur estis akirinta atenton kaj agnoskon de diversaj kleruloj kiel multpromesa filologo. En tiu tempo Þórbergur verkis detalajn klarigojn pri *Snorra-Edda*, la mitologia kaj poetika libro de *Snorri Sturluson* el la 13a jarcento. Li ankaŭ ricevis dum kelka tempo oficialan subvencion por kolekti vortojn el la popola parol-

lingvo. Tiam li piediris dum la somero tra la lando kun valizo sur la dorso kaj registris milojn da vortoj, kiuj ne estis troveblaj en la literaturo. Li kolektis ankaŭ popol-rakontojn, kiuj poste estis eldonitaj en kunlaboro kun *Sigurður Nordal*, universitata profesoro pri islanda literaturo.

La eseoj de Þórbergur evidentigis lian fortan tendencon enplekti sian propran personon en la plej diversajn temojn, kio des pli intensigis la karakteron de lia stilo. Tiel shajnis nature kaj logike, ke li tentighis priskribi sian propran vivon, surbaze de siaj taglibroj. La rezulto estis du libroj: *Islandaj nobeloj (Íslenskur aðall, 1938)* kaj *La Trosaghulo (Ofvitinn I-II, 1940-41)*. La titoloj rilatas unuflanke al junaj proletaj poetoj, amikoj de Þórbergur, aliflanke al Þórbergur mem, kiu jam en infanagho estis sherce primokata pro siaj nesatigeblaj sciavido kaj eksperimentemo. Tiuj du libroj pritraktas nur kvin jarojn de lia vivo, 1909-1913. Kvankam tiuj libroj havas realisman koloron kaj la aŭtoro asertas, ke li diras nur la veron, tamen tiuj libroj estas plenaj de strangaj personoj, kuriozaj okazajhoj kaj ridigaj ideoj. Ili estas ne nur la historio pri Þórbergur Þórðarson mem, samtempe logikema realisto kaj romantikema revanto, kiu sin trovas sur filozofia vojkrucigho, kaj ankaŭ akra polemikanto, ili rakontas ankaŭ la historion de lia samtempo kaj tiun de la junaj, burghonantaj poetoj, kiuj vigle partoprenas la dancon de vivo sur la paghoj de la libroj. Au lau la vortoj de Þórbergur mem: unuflanke li rakontas pri "la batalo de senhelpa junulo en la mallumoj de la homa mondo, kiel li serchas la saghon, perdas sian vojon al la amo, humilighas en sia mizero", aliflanke li priskribas la spiritan atmosferon kaj pensmanierojn dum "la lastaj jaroj de la trankvilaj tempoj". Kaj chion potencigas la eksterordinara persona stilo de la aŭtoro kaj lia supera rego de la islanda lingvo.

Tiom verkinte pri si mem Þórbergur sin turnis al verkado de biografio de alia homo, pastro *Árni Þórarinsson*, kiu tiam estis en siaj naudekaj jaroj. Tiu verko aperis en la jaroj 1945-50, en ses volumoj. La biografio de pastro Árni estas unika en la islanda literaturo kaj apenau estas komparebla al iu ajn alia, krom eventuale al la verko de la angla verkisto James Boswell pri d-ro Johnson. Oni ja povas diri, ke Þórbergur kaj Boswell estas multflanke similaj personoj, ekzemple en tio, kiom plachis al ili shoki la sanan prudenton de siaj samlandanoj kaj kiom preteme ili humore ridindigas sin mem. Pastro Árni Þórarinsson estis supera rakontisto kaj originalulo kaj Þórbergur elsorche transportas lian karakteron sur la paghojn de sia libro, elfluas liaj historioj, anekdotoj kaj komentoj, liaj priskriboj de personoj, spritajhoj, shercoj, parodioj, antaŭjughoj, rakontoj pri mirakloj kaj okultaj fenomenoj, chio esprimita en la simpla, tradicia rakonto-stilo de pastro Árni mem, kies mastro Þórbergur ankaŭ estis. Estas dirite, ke dum la verkado Þórbergur sin tiom identigis kun sia rakontanto, ke li imitis la vochon kaj la irmanieron de la

pastro ghis tia grado, ke li konsiderinde maljunighis dum tiu tempo! Per *La Biografio de Árni Þórarinnsson* la stilo de Torbergur celemas al plisimpligo por ebligi tiun senvestighon de la persona karaktero kaj igi la temojn de la rakontado paroli memstare, pli ol la kontrolantan verkanton. Tiu stil-tendenco sin pleje manifestas en la sekvanta libro de Þórbergur.

Þórbergur neniam chesis surprizi siajn samlandanojn, nun, post la granda biografio de la maljuna Árni Þórarinnsson li komencis verki alian unikan libron, chi-foje pri okjara knabino, nepino de sia edzino. Li diris mem, ke antau ol la inspiro volis lin viziti por ekverki tiun libron li devis mallevi sin sur la genuojn en sia skribochambro kaj rampi al sia libroshranko kaj babili kiel infano. Li do trovis la plej efikan rimedon eltiri sin el sub la maljuniga imitado lau pastro Árni. Tiu libro, *La himno pri la floro (Sálmurinn um blómið)*, du volumoj, 1954-55), estas malsimila al chiuj libroj en Islando kaj eble en la tuta mondo. En tiu libro la aŭtoro esprimas sin lau la pensmaniero kaj vortuzo de la knabineto, li parolas kun shi pri la plej diversaj temoj, de chiutagaj aferoj al la mond-politiko, li estas kiel la infano "en sia kapo kaj en sia tuta koro".

En siaj lastaj verkoj Þórbergur sin denove turnis al sia autobiografio. Ghi aperis en kvar volumoj, la lasta nur post la morto de la verkisto. Estas klare, ke en chiuj tiuj libroj Þórbergur celas verki en stilo plejeble senpretenda kaj simpla, sen iaj ajn retorikaj rimedoj. La temo en chiuj kvar volumoj estas la infanaghaj cirkonstancoj de la aŭtoro, la chiutaga vivo en izolita islanda kamparo en la komenco de la 20a jarcento, kunvivado de homoj kaj bestoj, popolaj supersticho, infanaj ludoj, priskriboj de personoj, sciencemaj eksperimentoj kaj la mezur-manio de la verkisto kiel infano per primitivaj rimedoj. Þórbergur jam en *Letero al Laura* priskribis sian infanaghon kvazau en nuksoshelo, sed en chi tiuj lastaj verkoj la rakonta stilo estas tute alia. La ekscita karaktero de la rakontado ne trovighas en priskribo de okazajhoj, sed interne de la rakontanto mem, en liaj animaj spertoj, liaj imagoj kaj antaugoj. Li scipovas per sia detale esploranta, tamen simpla stilo vivantigi la plej infanecajn okazajhojn.

La supraj priskriboj de la verkista kariero de Þórbergur Þórðarson en la islanda lingvo povas doni nur suprajhan ideon pri la karaktero, amplekso kaj influo de liaj verkoj. Multon mi devis ellasi, ekzemple liajn librojn, originalajn kaj tradukitajn kaj liajn polemikajn artikolojn, i.a. pri politiko. Sed nun jam estas tempo pritrakti Þórbergur Þórðarson kiel apostolon de la internacia lingvo en Islando.

Þórbergur eklernis Esperanton en 1925. Li priskribis sian inicighon en la internacian lingvon tiamaniere humorstile en sia "kroniko de renaskighoj":

"1925: Renaskighis malrapide kaj ghentile en Esperanton per duonhora legado chiutage. Tiu chi renaskigho komencighis en la monato majo en la

barbirejo de Sigurður Ólafsson dum mi legis reklaman afishon, kiu pendis sur la muro sur kiu estis skribitaj jenaj bongustaj vortoj: "La suko estas farita el sukero kaj beroj kiel la plej bona eksterlanda suko", kio poste pruvighis mensogo. En monato julio 1926 tiu ghi renaskigho tiom min elokupis, ke mi malestimas chion krom Esperanto kaj Esperanto-literaturo dum la sekvantaj 6 jaroj. Legis Esperanton dum 10 ghis 20 horoj de la tagnokto. Devis legi en la fekejo, kaj ja des pli multe kie pli bone odoris."

La unua verko de Þórbergur inspirita de tiu nova spirito estis gazeta artikolo, kiu aperis jam la 18an de majo 1925, sub la titolo: "La kapitalismo malshatas edukighon de la laboristoj". Tie li atakas la tendencon en tiu tempo pliigi la instruadon de la latina lingvo kaj forte rekomendas ghian anstatauigon per Esperanto.

Cetere li dankas al sia amiko, *Vilmundur Jónsson*, shtata chefkuracisto kaj esperantisto, sian enkondukon en la lingvon. Dum sia restado en Stokholmo 1926 li achetis Esperantajn librojn kaj en Kopenhago li komencis ilin studi. En la sama somero li partoprenis la kongreson de SAT en Edinburgo. Lia entuziasmo pri neutrala internacia lingvo kaj ghia rolo, precipe por la laboristaj klasoj, tiam levighis en plejajn altojn. Li priskribas sian animlevighon en sia artikolo *Trimil tricent sepdek nau tagoj el mia vivo*, antaue menciita, per jenaj vortoj: "En Edinburgo mi unue legis pri SAT. En la sama momento mi farighis SAT-ano kaj abonis *Sennaciulon* kaj *Sennaciecan Revuon*. Mi tute estas sennaciulo, ech universano. Chie, kie suno lumas kaj herbo kreskas, estas mia hejmujo. Mi propagandas sennaciismon lau mia povo." Li priskribas sian vivon dum la tuj sekvantaj jaroj en la sama artikolo: "Mi għenerale vekighas chirkau la oka horo. Tiam mi komencas labori, legi au skribi en la lito. Intertempe mi kolektas vortojn kaj esprimojn el libroj de Zamenhof. Je la deka mi ellitighas, faras ekzercojn de J. P. Müller [dana korp-ekzercisto, kies libro pri la temo tiam furoris en Danujo kaj estis tradukita en la islandan] kaj prenas banon au naghos en la maro. Je la dekdua horo mi manghas kaj diskutas politikon kun miaj sammanghejanoj. Je la dektria mi hejmeniras kaj skribas au legas ghis la deknaua horo. Tiam mi vizitas razejon kaj tie legas gazetojn. Post la razado mi vespermanghas. Dum la vesperoj mi priparolas au diskutas diversajn aferojn kun konatoj, ekzemple politikon, Esperanton, filozofion, teozofion, literaturon, psikologion ktp. Ofte mi ankau rakontas historiojn au prezentas biografiajn skizojn. Chirkau la dudekkvara mi kushighas en mian liton kaj legas ghis la unua horo. Tiam mi ekdormas, se mi povas. Iafoje mi kushas maldorma ghis la tria au kvara horo. Dum junio kaj julio mi povas legi au skribi la tutan "nokton" en hela taglumo. Ofte en la noktoj min vekas preskau sovagha entuziasmo, ghuste kvazau ia fantomo, dio au

diablo baraktas en mia tuta animo. Kaj humile mi estas devigata obei la mistikan tiranon kaj skribi senchese dum du ghis tri horoj."

Ankorau denove Þórbergur estis ekvidinta la lumon de la vero. Lia adorado de Esperanto estis logika sekvo de liaj socialismaj kaj internaciismaj idealoj. Li ekvidis la vojon kaj nenio povis deturni lin de tiu vojo. La sekvo estis: sesjara studado de Esperanto per 10 ghis 20-hora legado chiutage. Kaj kompreneble li baldaŭ komencis disvastigi la novan evangelion. Inter la 15-a de decembro 1926 ĝis la 22-a de januaro 1926 li aperigis serion da artikoloj en ĵurnalo sub la komuna titolo *Nova sentorgano (Nýtt skilningarvit)*. Multajn tiajn artikolojn li aperigis en sekvantaj jaroj. Sed la plej grandiozan faron por informi la islandan popolon pri Esperanto kaj ghin propagandi per apostola fervoro estis lia libro *Internacia lingvo kaj lingvachoj (Alþjóðamál og málleysur, 1933)*, 351-paĝa, eldonita de la ŝtata eldonejo. Simila libro en nacia lingvo ne estis aperinta en iu alia lingvo en tiu tempo, kaj apenau ghis nun, konsiderante la akumuladon de faktoj kaj la konvinko-forton de la stilo de elstara verkisto. Tiu stilo ofte proksimas al tiu de la ofte celfrape kaj ironie polemikaj artikoloj kaj eseoj de Þórbergur. Li enkondukas sian libron jene: "Antaŭ kelkaj tagoj mi hazarde renkontis surstrate unu konaton mian, reputacian kooperativanon. Li donis al mi la gravan informon, ke Esperanto estas nekonata en aliaj landoj. Mi demandis lin por amuzo, kiel li scias tion. Li sciis tion, ĉar li neniam vidis esperantiston dum siaj aferecaj vojaĝoj eksterlande. "Tio estas simila kiel pri mi", mi respondis. "Mi vizitis 11 landojn kaj en neniu el tiuj mi vidis eĉ unu kooperativanon. Kaj tamen vi fanfaronas pri potencaj kooperativaj societoj en ĉiuj landoj". Estis kvazaŭ tiu mia konato kaj mi atendus, ke en eksterlando la esperantistoj kaj la kooperativanoj portas iujn specialajn simbolojn kaj okulfrapajn reklamojn sur sia eksterajho, ekzemple kokokriaĵajn trumpetojn sur la busho aŭ ekfajrantajn eksplodojn el la postajho".

Tiu eksterordinara libro de Þórbergur estas dividita en 28 ĉapitrojn, kie li funde kaj detale traktas ĉiujn flankojn kaj aspektojn de internacia lingvo kun abundo da informoj pri la tiama disvastigo de Esperanto. Li priskribas la originon kaj karakteron de kelkaj aliaj planlingvoj (*Ido, Occidental, Interlingua, Novial*), kaj dedichas apartan ĉapitron al *Basic English*. (Lia kritikado de la laste menciita kaŭzis fortan reagon de anglomaniaj kleruloj, kiun Þórbergur kompreneble pli forte rebatis en ĵurnala artikolo). Aparte rimarkinda estas lia pritrakto de la argumentoj kontraŭ Esperanto fine de la libro. Li opinias, ke la plej insista argumento kontraŭ Esperanto devenas el la antujughemaj sentoj de tiuj, kiuj nenion scias pri la lingvo, sed opinias sin tamen aŭtoritatoj pri la naturo de lingvo kaj literaturo. Tiuj "argumentas": Ĉiuj artefaritaj lingvoj estas neuzeblaj. Esperanto estas artefarita lingvo. Sekve: Esperanto estas neuzebla.

Ĥorbergur komence atentigas pri tio, ke li jam en sia libro prezentis klarajn argumentojn pri tio, ke tiel nomita artefarita lingvo estas tute same kapabla ludi sian rolon por kio ajn kiel la naturaj lingvoj. Li montras al la antagonistoj de Esperanto, ke ili starigas sian komparon inter artefarita lingvo kaj natura lingvo sur malghusta bazo, ke ili komparas la nocion "artefarita lingvo" kun sia propra lingvo, kaj el tiu komparo ili jughas pri la valoro de la artefarita lingvo. Sed tia bazo de komparo estas absolute malghusta. La viv-valoron de artefarita lingvo oni komparu ne kun la viv-valoro de sia propra lingvo. Ghian viv-valoron oni komparu kun tiu viv-valoro, kiun fremdaj lingvoj povas havi por ni. Komparon de artefarita lingvo kaj natura lingvo oni do vortigu jene: Chu artefarita lingvo povas farighi same vivanta por mia lingvo-sento kiel fremda natura lingvo, ekz-e la angla, germana, franca ktp.? Estas agnoskita fakto, ke fremda nacia lingvo estas "artefarita" por chiuj, kiuj ne posedas ghin kiel gepatran lingvon, au ne estas al kutimighinta pensi en tiu lingvo post longa restado en tiu lando, kie ghi estas parolata. "Artefarita" signifas chi tie, ke ni ne havas same vivantan lingvosenton pri fremdaj lingvoj kiel pri nia propra. (Chi tie Ĥorbergur enmetas, ke tamen estas kelka diferenco; ju pli parenca la fremda lingvo estas al nia gepatra lingvo, des pli proksime ghi staras al nia senta percepto. Al Islandanoj la skandinavaj lingvoj estas la plej proksimaj, poste la germana, tiam la angla). Do, komparo inter Esperanto kaj fremda nacilingvo estas fakte komparo inter du "artefaritaj" lingvoj. Estas tial stultajho kontraumeti fremdajn nacilingvojn kiel vivantajn lingvojn al iu "artefarita" au "morta" Esperanto, char ambau estas same senvivaj por nia lingvosento. La diferenco estas, ke Esperanto havas pli grandajn eblecojn ol la fremda nacilingvo por sin sentigi al ni kiel vivanta lingvo, char ghi estas chiuflanke pli internacia kaj "travidebla", multe pli simpla, multoble pli rapide lernebla, kio sekvigas, ke estas pli facile eniri ghian spiriton, ghin prisenti.

Ĥorbergur daurigas sian argumentadon per priskribo de tiu aspekto de la lingvo-scienco, kiun li nomas lingva tekniko. Li citas prof. *Otto Jespersen*, ke la lingvistoj ghis "nun" (t.e. konferenco de lingvistoj en Ghenevo 1931) malmulte atentis la konscian kaj celhavan klopodadon en la evoluo de la t.n. naturaj lingvoj kaj tro multe neglektis aktive partopreni en tiu klopodado. Ĥorbergur daurigas per vasta ekzemplaro, kiu pruvas la konscian kreadon de novaj vortoj en la naciaj lingvoj, i.a. la islanda. Tio, lau li, klare pruvas, ke la naciaj lingvoj konstante estas plirichigataj per artefaritaj rimedoj, ke la evoluon de la "naturaj" modernaj lingvoj chiam pli karakterizas konscie kreitaj elementoj, do, ke ilia "natureco" au "malartefariteco" estas miskoncepto, chiam pli malaktuala. La koncepto "artefarita lingvo" fakte ne plu havas faktan sencon.

Tiu libro de Þórbergur vekis multan atenton, ne nur pri Esperanto, sed ankau pro la detala pritrakto de kreado de novaj vortoj en la islanda lingvo. La islanda havas apartan pozicion inter la europaj lingvoj en tiu senco, ke ghi tre malfacile akceptas pruntvortojn el aliaj lingvoj, oni preferas krei novajn el indighenaj radikoj, uzante la eksterordinaran rimedaron de la lingvo por formi novajn pure islandajn vortojn. En tiu tempo tiaj vortoj estis chefe kreitaj de individuoj, nuntempe tiun kreadon plejparte prizorgas specialaj lingvo-komisionoj, kio rezultis en multaj dekmiloj da novaj vortoj sur chiu kampoj de scienco kaj tekniko. En sia traktado Þórbergur faris gravajn esplorojn pri la origino de centoj da novaj vortoj kaj kiel ili enkondukighis en lingvo-uzadon. Tiu lia esplorado estis pionira kaj akiris estimon de islandaj lingvistoj. Ne estas dubo pri tio, ke precize tiu speciala parto de lia libro, koncernanta la islandan lingvon, favore efikis al kleruloj ankau koncerne lian pritrakton pri Esperanto.

Þórbergur komencis instrui Esperanton en 1931 post partopreno en kurso de la Cseh-instituto en Arnheim en Nederlando, kie li lernis instrui la lingvon lau la metodo de Andreo Cseh. Li instruis Esperanton en kursoj dumvintre ghis 1936 kaj pere de la shtata radio dum la vintroj 1936-38. Li verkis lernolibrojn por siaj kursoj: *Esperanto I*, kiu estas legolibro por komencantoj kun mallonga, tamen tre klara, priskribo de la gramatiko (1937), kaj *Esperanto II*, 111-pagha detala gramatiko de la lingvo kun multegaj ekzemploj, precipe koncerne la afiksojn kaj la prepoziciojn. Li ankau dum multaj jaroj laboris pri verkado de *Islanda-Esperanta Vortaro*, kiun tamen li ne finis; la sliparo estas konservitaj en la Nacia Biblioteko de Islando. (Jarojn poste alia bonega esperantisto, Baldvin B. Skaftfell verkis *Islandan-Esperanto Vortaron*, kiu estis eldonita 1965. *Esperanto-islanda vortaro*, negranda, de Ólafur Þ. Kristjánsson, aperis en 1939, dua eldono, iom ampleksigita en 1952, represita en 1981. Skota esperantisto, elstara spertulo pri la islanda lingvo, Hugh Martin, antau kelkaj jaroj finis verkadon de granda *Esperanto-islanda vortaro*, kies manuskripton li donacis al la Islanda Esperanto-Movado. Tiu vortaro jam estas komputile kompostita kaj alirebla de islandaj esperantistoj en provizora eldono).

Jam en la komenco de sia Esperanto-kariero Þórbergur ekhavis la firman decidon farighi verkisto en la internacia lingvo. Liaj originalaj verkaĉoj en Esperanto konsistas el kelkaj tre longaj artikoloj, kiujn li tujsekve tradukis en la islandan lingvon. Ili estas lau tempa ordo: *La filozofio de l'mizero (Heimspeki eymdarinnar, 1927)*, *Letero al socialdemokrato (Bréf til jafnaðarmanns, 1928)*, *Trimil tricent sepdek nau tagoj el mia vivo (Þrjú þúsund þrjú hundruð og níu dagar úr lífi mínu, 1928)* kaj *Letero al nazio (Bréf til nazista, 1933)*. Chiuuj krom la tria menciita estas akraj politikaj traktajhoj elvokitaj de la indigno de la

autoro pro apartaj cirkonstancoj. Ili chiuj vekis multan atenton kaj diskuton en la islanda gazetaro, pri ilia efiko en la Esperantaj mankas informoj. Pro la unikeco de tiuj verkajhoj ili meritas kelkan komentadon.

En aŭgusto 1927 la vicprezidanto de la Internacia Teozofia Societo, sinjoro C. Jinarajadasa, vizitis Islandon por fari prelegojn kaj partopreni kunsidojn de la Teozofia Societo en Reykjavík. En unu el tiuj kunsidoj sinjoro Jinarajadasa proponis al la societanoj, ke ili prezentu al li skribajn demandojn, kiujn li promesis respondi en la sekvonta kunsido. Þórbergur, kiel studanto de teozofio, uzis la okazon kaj prezentis sep demandojn al la vicprezidanto. Nun estas menciinde, ke en tiu tempo Þórbergur jam farighis entuziasma socialisto, kaj chiuj liaj demandoj esprimas lian malkontenton kaj lian akran kritikon pri la neutrala sinteno de la teozofoj koncerne la klasan batalon de la laboristoj. La kerno de lia kritiko estas la jena: Chu la teozofiaj gvidantoj opinias, ke ordinaraj homoj povos akiri spiritan felichon dum ili vivas en konstanta malricheco, mizero kaj needukiteco kaj devas daŭre uzi chiujn siajn spiritajn kaj korpajn fortojn en malespera batalo por kontentigi siajn plej urghajn vivbezonojn? Al tiu kerna demando li alligas ankaŭ la bezonon por neutrala internacia lingvo. Oni apenau bezonas diri, ke Þórbergur trovis la respondojn de sinjoro Jinarajadasa al siaj demandoj nebulaj kaj nekontentigaj. Li tial tuj post la koncerna kunsido verkis longan eseon en letera formo, adresitan al tiu sinjoro. Li mencias en la komenco, ke li verkas ghin en Esperanto, ĉar Jinarajadasa, en sia responda parolado, estis komparinta "la belecon de Esperanto kaj Ido" kvazau tiuj lingvoj estis al li konataj (kio estas ja pridubinda). Mallonge dirite, tiu eseo, kiun Þórbergur titolis *La filozofio de l'mizero*, estas akre argumentita atako kontraŭ la politika naiveco kaj la hipokriteco de la teozofoj, farita de senlaca serĉanto de la vero kaj lingva stilisto de la plej alta kvalito. Ne estas informoj pri tio, ĉu sinjoro Jinarajadasa efektive iam legis aŭ komprenis la eseon de Þórbergur, sed la islandlingva versio havis drastan efikon, almenaŭ inter la islandaj studentoj de teozofio. Fine de la eseo Þórbergur elmetas siajn konkludojn en 12 punktoj, kie li emfazas, ke eksteraj cirkonstancoj regas la pensojn kaj kondutojn de ordinaraj homoj, ke nur favoraj ekonomiaj cirkonstancoj ebligas spiritan maturighon, ke nur la socialismo kapablas plibonigi tiujn cirkonstancojn kaj ke nur "artefarita" lingvo povas farighi komuna, interpopola komunikilo en dinamika harmonio kun plibonighanta socia ordo. La eseon li sendis al la Esperanto-revuo *Nova Epoko*.

Koncerne la duan eseon, *Letero al socialdemokrato*, Þórbergur mencias enkonduke, ke unu al la redaktoroj de *Nova Epoko* skribis al li kelkajn liniojn pri religio kaj politiko, ricevinte lian manuskripton de *La filozofio de l'mizero*. Tiun leteron de la redaktoro li repondis en Esperanto per *Letero al socialdemokrato*. En tiu eseo Þórbergur ankoraŭ pli disvolvas siajn ideojn pri kunligo de religio kaj socialismo, kion la redaktoro opiniis

absurda supersticho. Li avertas kontraŭ tio kunmiksi la misuzadon de religio kaj la esencan postulon de la homo havi spiritan vivon. Li detale klarigas, kiel la kapitalistoj uzis la religion por senvalorigi la humanismajn postulojn de la socialistoj. Li elmontras, kiel la kristanismo estis origine religio de la proletaro. Li asertas, ke metodoj de la teozofoj en la esplorado de la esenco de la homa animo meritas atenton, sed ke tamen multaj teozofoj uzas la teozofion serve al la kapitalistoj, kio estas krimo de homoj, kiuj konsideras sin teozofoj, sed nek komprenas nek agnoskas, ke la batalo de la socialistoj por pli bona ekonomia vivo estas nepra kondiĉo por spirita maturiĝo. La *Letero* estas elokventa kaj strikte argumentita traktado pri la klopodado de la aŭtoro trovi komunan bazon de la spirita kaj materia vivo de la homoj.

Sian *Leteron al nazio Þórbergur* prezentas per jena enkonduko: "La Asocio de Esperantistaj Instruistoj sendis al mi antaŭ nelonge gazeton kaj aparte presitan paroladon de Adolf Hitler, ambau en Esperanto. La gazeto nomighas *La Nova Germanlando* kaj la parolado havas la titolon: *La Mondo atentu: Parolas Adolf Hitler*. Antaŭe tiu asocio de instruistoj eldonis bonegan Esperanto-revuon pri instruado kaj edukado. Sed la revuo estis liberala, tial ĝi estis elpelita el Germanio, kiam "la nokto de la longaj ponardoj" kushighis super la landon lastvintre. Nun ĝi estas eldonita en Nederlando. Nun la Asocio, anstataŭ la bonega eduk-revuo, dissendas tra la mondo *La Novan Germanlandon*, kiu ĉi-foje estas tuteca atako kontraŭ la Judoj. La parolado de la kanceliero, kiu ankau estas dissendita en la nomo de la Asocio, estas la plej kompatinda galimatio, kiun mi iam ajn vidis en presita formo. Konstatante tian plorindan fakton, ke edukitaj homoj dissendas tiomegan mizerajhon de stulto kaj senscio tra la mondo, mi tiom chagrenighis, ke mi skribis al la redaktoro jenan leteron". Tiu letero (kiu kompreneble estis nek aperigita nek respondita) estas pezega bato kontraŭ la naziismo, verkita en vortriĉa, emocia stilo, plena je nudaj faktoj kaj akraj kritikoj pri la krimaj kondutoj de la nazioj. Þórbergur tuj tradukis la *Leteron* en la islandan kaj ĝin aperigis en ĵurnalo en novembro 1933. Ĝin baldaŭ sekvis kelkaj pliaj pri la sama temo en la islanda lingvo, en la unua, titolita *Kvalaporsti nazista (La tortur-manio de la nazioj)* trovighas "ofendaj eldiroj" pri Hitler pro kiuj Þórbergur estis jure akuzita pro *laesa majestas*, krimo kontraŭ suvereno de ŝtato, juĝita kulpa de suba tribunalo, sed deklarita senkulpa de la supera tribunalo.

Kiel konstateble, tiuj ĉi artikoloj de Þórbergur, originale verkitaj en Esperanto, konkretighas en intima kuneco kun lia polimikado en la islanda lingvo, ambau lingvoj harmonie kunlaboras en komuna esprimado en unika plifortigo por dinamika partopreno en la islanda kulturvivo en tiu periodo.

La kvara artikolo, *Trimil tricent sepdek nau tagoj el mia vivo*, estas de alia karaktero. Ghi aperis en *Sennaciulo* 1928 en serio de artikoloj de diversaj SAT-anoj, priskribantaj unu tagon el iliaj vivoj. Pórbergur enkondukas la islandlingvan tradukon de tiu sia artikolo per jenaj klarigaj vortoj: "Plej multaj el tiuj artikoloj estis verkitaj de laboristoj kaj priskribis senlaborecon, malsaton kaj mizeron au enuigan, malrapide mortigan penlaboron sur kampoj, en fabrikoj kaj minejoj de la kapitalistaj mastroj. Legante tiujn monotonajn priskribojn de mizero mi ekhavis la ideon amuzi Esperanto-legantojn per mallonga rakonto pri interesa periodo de mia vivo. Mi elektis por tio la tagojn ekde la 1-a de oktobro 1918 ghis la 1-a de januaro 1928. La redaktoro ghoje akceptis mian artikolon, ghin aperigis en la gazeto antau kelkaj semajnoj kaj donis al ghi la ateston, ke mi estas unu el la plej bonaj stilistoj, kiuj verkas en Esperanto. Pliaj Esperanto-legantoj kaj verkistoj esprimis al mi sian laudon kaj dankon. Mi mencias chi tion pro la fakto, kaj iuj el miaj samlandanoj sufiche multe klopodis por provi konvinki min kaj aliajn pri tio, ke tiu laboro, kiun mi dedichis al studado de Esperanto dum la tri pasintaj jaroj, neniam vidigis iun ajn rezulton".

Pórbergur Pórðarson ne apartenis al tiuj, kiuj, tro modestaj pri siaj kapabloj, kashas sian lumon. Li ja estas agnoskita kiel unu el la plej bonaj stilistoj en la islanda lingvo, kaj certe la plej originala. Ke li sukcesis ankau kiel elstara stilisto en la internacia lingvo, do estas natura sinsekvo. En la autobiografia artikolo en *Sennaciulo* li komentas ankau la temon de stilo en Esperanto. Shajnas ne sen intereso citi kelkajn frazojn el tiuj liaj komentoj de antau pli ol sepdek jaroj: "Bedaurinde multaj Esperantaj libroj, gazetoj kaj revuoj ne prezentas efektive bonan kaj amuzan stilon. Shajnas al mi, ke krom la genia Zamenhof, proporcie malmultaj Esperanto-autoroj verkas bonstilajn legajhojn. Multaj niaj verkistoj esprimas siajn pensojn peze, mallerte kaj ne klare. Ili ofte amasigas en unu vorton tro multe da radikoj. Tio faras la vortojn longaj kaj malgraciaj. La vortordo ofte estas absurda kaj similas diversajn stultegajn esprimmodojn de naciaj lingvoj. La frazoj ofte estas tro longaj, malsimplaj kaj malklaraj. La esprimoj ne varias sufiche. Kaj tempoj de la verboj multfoje estas tro komplikaj en la sama frazo. Pro tiu neperfekto la legajho farighas malflua, neklara, malfacila kaj perdas efikon. En miaj libroj trovighas kelkaj Esperanto-libroj, kiuj estas tiel malbonstilaj, ke mi tute ne komprenas ilian enhavon. Inter tiaj voluapukajhoj mi volas mencii libron de Henri Barbusse: *Eklumo en la abismo*. Trifoje mi provis legi chi tiun libron. Sed laca kaj kolera mi chiam devis chesi. Por miaj oreloj ghi sonas kiel nekomprenebla korvolingvo. [Sekvas citajho kiel malbona ekzemplo el la libro de Barbusse]. Lau mia primitiva opinio oni presigas librojn por legado. Se mi pravos en tio, ili devas esti facile legeblaj kaj kompreneblaj, almenau se ghi faru utilon al neklera Proletaro.

Ordinara homo ne havas okazon au paciencon malshpari sian tempon por neklara kaj afekta pedanteco. [...] La malmodernan, stultan kaj pedantan "scienco-stilon", kiu en malnovaj tagoj okupis la akademian mondon kaj ankoraŭ sharghas mensojn de multaj germanaj aŭtoroj, la modernaj revoluciuloj devas elpeli por chiam el nia Esperanto-literaturo. Libro ekzistas por legantaro. Sed la legantaro ne estas kreita por rompi siajn cerbon en infana pedanteco de putraj akademianoj".

En 1959 aperis libro titolita *Ĝi kompanii vi ĉi allifiĉ* (*En kompanio kun la universala vivo*). Ĝin konsistigas intervjuo serio, kiun la poeto kaj ĵurnala redaktoro *Matthías Jóhannesen* havis kun Þórbergur. En tiuj intervjuoj Þórbergur esprimas sin pri la plej diversaj aferoj laŭ sia persona, sprite originala maniero. Kompreneble li ne ellasas Esperanton el tiu temaro. Shajnas inde fini tiun ĉi traktajhon pri unu el la plej eksterordinaraj verkistoj en iu ajn lingvo per karakteriza citajho el tiu libro. La intervjuato kaj la intervjuanto sidas en la librochambro de la verkisto, ili iom trinkas vinon kaj disparolas, i.a. pri la amo. Þórbergur komencas paroli pri la komunismo, sed *Matthías* lin interrompas: "Prefere diru al mi iom pli pri la amo". *Þórbergur*: "- Jes, la amo plej ofte similas al veziko, tion mi diris en poemo. Sed, auskultu, estas strange rigardi la lunon en Kantono. [Aludo al la vizito de Þórbergur al Ĉinio]. Tie ĝi kushis preskau sur la dorso. Ankau la amo foje kushas sur la dorso. Sed ĉu vi jam ne ekmalsombras? Margrét [Margareto, la ekzino de la Þórbergur] devas alporti pli. Tiel estas la vivo. [Ĉi-tiun frazon Þórbergur diras en Esperanto]. Zamenhof estas unu el la plej grandaj homoj, kiuj vivis sur tiu ĉi tero. Li estas la unua homo kiu sukcesis krei lingvon, pri kiu ĉiuj popoloj povus unuighi, se ili havus iom da sagho en la kapacho. En Esperanto ne ekzistas plivaloraj au malplivaloraj. Sed la sklava submetighemo estas tiom granda en la mondo, ke la homoj preferas parolachi malplivaloran anglan kun angloj ol stari sur grundo de lingva egalrajteco per Esperanto antaŭ la angloj kaj aliaj popoloj. Ne troveblas interna fiereco en tiuj maldignuloj, nur aplomba vento kaj la cetera parto rampas kiel vermoj".

Kiel mi jam diris en la komenco estas malfacile ghisfunde pritrakti la homon kaj verkiston Þórbergur Þórðarson. Mi esperas tamen, ke mi povis ghis certa grado prezenti al la legantoj de tiu ĉi artikolo eksterordinaran homon, elstaran verkiston en la islanda lingvo, humoriston, senlaca serchanton de la vero kaj la plej aktivan propagandiston de Esperanto inter Islandanoj, homon kiu tro longe restis nekonata al esperantistoj ekster Islando.

(*Por informo*: La islandaj literoj **Þ** kaj **ð** estas prononcataj kiel angla **th** en **thing** kaj **this**, respektive).

Baldur Ragnarsson (Islando)